


# esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 1/2004  
Dumonata bulteno eldonata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Februaro 2004

This issue of *Esperanto USA* is brought to you through the selfless support of  
Ellen Eddy.



Look inside for:

<b>Recenzoj</b>	<b>4</b>
<b>Distra Angulo</b>	<b>8-11</b>
<b>Forpasoj</b>	<b>11</b>

**Novajo! Esperanto -  
Learning and Using the  
International Language  
de David B. Richardson  
denove haveblas. Vi  
povas mendi ĝin de la  
Centra Oficejo kontraŭ  
po \$15.00: Kodo :  
ESP046**

## **Bonvenon al Sidney!**

Sidney estas bonega loko por ferii. Ĝi troviĝas tuj norden de Viktorio, sur la insulo Vankuvero - aliborde de la urbo Vancouver. Multaj transportaj alternativoj eblas: aŭ flugoj al Viktorio, al Vankuvero kaj poste per pramo aŭ tra Seatlo. La vojaĝo mem povas esti belega sperto.

Sidney estas pitoreska apudakva komunumo. Ĝi ofertas butikumadon, restroaciojn, artaj galeriojn, naŭ librovendejojn, parkojn kaj apudbordajn promenojn ĉirkaŭatajn per belaspektaj oceanaj kaj montaraj pejzaĝoj. Sidney estas plene atingebla por radseĝoj por handikapuloj kaj ekipita per aŭdeblaj semaforoj ĉefstrate.

## **Esperanto Ligo por Nord-Ameriko kaj**

### **Kanada Esperanto Asocio**

Kore invitas vin partopreni en nia rara, duobla kongreso: la 52a jarkongreso de ELNA samtempe kun kongreso de KEA Kongresejo: Mary Winspear Centre, Sidney BC

**16-19 julio 2004**

Julia vetero estas vere glora, kutime sunplena, ne tro varmega, kaj tre malofte pluva. Venu al la lando de montoj, arbaraj, akvoj, balenoj, agloj, salmo, ĝardenoj, kaj tradicia gastamo.

De posttagmezo la 16an - ĝis lundo tagmeze la 19an de julio, ĝuu kunlabori kaj kunludi kun Esperantistoj! La estraro de ELNA laboros la tutan tagon vendrede antaŭ la ekkomenco de la inter-kona vespero je la 7a vespere. Vi rajtas vidi kiel ni faros nian laboron se vi deziras. La oficiala malfermo okazos sabate matene kaj la bunta programo daŭros ĝis lundon tagmeze. Kiel parton de la kongreso ni ĝuos bankedon kaj bonegan koncerton.

Esperanto League for North  
America  
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530  
USA/USONO  
☎510/653-0998; 📠510/653-1468  
✉elna@esperanto-usa.org

*President/Prezidanto:* Alexander Shlafer  
*Vice President/Vicprezidanto:* Phil Dorcas  
*Secretary/Sekretario:* Ellen M Eddy  
*Treasurer/Kasisto:* William B Harris  
*Other Board Members/Aliaj estraranoj:*  
Thomas Alexander, Joel Amis, Anna  
Bennett, D Gary Grady, Anjo Harlow, Lusi  
Harmon, Orlando E Raola, Jacob  
Schwartz, Tim Westover

*Director, Central Office/Direktoro de la  
Centra Oficejo:* Joel Brozovsky

### esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the  
Esperanto League for North America  
Dumonata bulteno publikigata de  
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko  
Vol. 40, No. 1  
ISSN 1056-0297

*Editor/Redaktoro:* Don Harlow  
☎510/222-0187; 📠510/653-1468  
✉donh@donh.best.vwh.net

Materials for esperanto usa should be  
sent to/Materialojn por esperanto usa  
oni sendu al:

esperanto USA  
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530  
USA/USONO  
or by e-mail/aŭ retroŝte al:  
e-usa@esperanto-usa.org

The opinions expressed in this bulletin  
are those of the authors, and don't  
necessarily represent the point of view  
of ELNA or its bulletin/La opinioj esprim-  
itaj en ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj,  
kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de  
ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is  
permitted, provided that due credit is  
given, and a copy of the reprinted materi-  
al is sent to ELNA/Estas permesate  
reaperigi materialojn el ĉi bulteno,  
kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj  
ke oni sendu ekzempleron de la repu-  
blikigita materialo al ELNA.

Deadline for issue 2004/3 Limdato por  
numero 2004/3: 28.05.2004

Vi ankaŭ povas veni frue kaj/aŭ resti  
pli longe por ĝui la regionon.  
Proponitaj ekskursoj posttagmeze la  
19an inkluzivos Butchart Gardens,  
Aviadila Muzeo de Brita Kolombio,  
La Mondo de Papilioj, kaj pramsipa  
vojaĝo al Sidney Spit Marine Park.

### Registriĝu Nun!

Vi povas uzi la aliĝilon en tiu ĉi  
novajletero - aŭ vi povas elŝuti ĝin  
de la retpaĝo:

esperanto.org/ELNA/kongreso  
2004. Ankaŭ aperos tie freŝaj  
infomŝanĝoj. Bonvolu aliĝi frue kaj  
indiki ĉe la aliĝilo ĉu vi deziras  
kontribui al la programo. Pro la  
fakto ke ni povas okazigi multajn  
sesiojn samtempe, vi estas invititaj  
aldoni erojn al nia bunta programo.

### SUBTENU LA KONGRESON!

Se vi ne povas ĉeesti la kongreson,  
konsideru registriĝon kiel  
**subtenanto de konferenco**.  
Subtenantoj ricevos materialojn,  
ĉiutagajn fotojn kaj resumojn de  
kongresaj eventoj, kaj publikan  
rekonon dum renkontiĝoj. Kaj, se  
poste via partopreno estiĝas ebla, vi  
nur pagos la diferencon inter la  
malalta malfrua kotizo kaj la kotizo  
de subtenanto, eĉ se la limdato jam  
pasis. Bonega maniero subteni  
ELNA kaj la kongreson!

### LOĜADO

La kongresa hotelo estas *Victoria  
Airport Travelodge* en Sidney. Ĝi  
estas tuj trans la strato de la  
kongresejo. La hotelo estas  
lastatempe renovigita, kaj enaj  
trajtoj inkluzivas klimaton,  
naĝejon kun varmigata akvo,  
senpagajn en-ĉambrajn kafon kaj  
teon, harar-sekigilojn, senpagan  
lokan komunikadon per telefono kaj  
perfakse, senpagajn tagjurnalojn,  
senpagan aŭtoparkadon, kaj la  
oficejon de *Thrifty Car Rental* en la

vestiblo. La plimulto de ĉambroj  
havas malgrandajn fridujojn kaj  
mikroondan fornon; se tiuj gravas,  
petu per telefono.

Kvanto da ĉambroj estas rezervitaj  
por la kongresanoj speciale  
malaltkoste ĝis la unua de julio:  
K\$115 (proks. US\$80) plus  
impostoj (proks. US\$12, parte  
repageblaj por nekanadanoj). Ĉi tiu  
prezo estas por la ĉambro kun litoj  
*king-size*, *queen-size* aŭ *double*. Ĉi  
tiu prezo validos ankaŭ se vi deziras  
alveni kelkajn tagojn antaŭe, aŭ resti  
kelkajn tagojn poste.

La prezo estos la sama por  
maksimume 4 personoj en unu  
ĉambro. Se vi volas enlistiĝi por  
trovi samĉambrojn, bonvolu indiki  
tion en la aliĝilo.

Por rezervi, telefonu 1-866-656-  
1176 senkoste. Menciuj ke vi estas  
parto de la grupo "Esperanto". Se vi  
havas specialajn preferojn (ĉambrojn  
por nefumantoj, specifan etaĝon,  
ktp), telefonu laŭeble baldaŭ.


Aliaj hoteloj apudaj:  
*Best Western*, 1-800-315-3377,  
ankaŭ tre proksima al la kongresejo.  
*Sidney Waterfront Hotel and Suites*,  
1-866-656-1131, proks. 6 stratojn  
for.

Haveblas ankaŭ aliaj hoteloj kaj  
B&B-oj en la urbeto kaj ĉirkaŭaĵo.  
Ĉi tiu kongreso estas bonega  
eklanĉa punkto por la Universala  
Kongreso en Pekino kiu  
komenciĝos sabate la 24an. Vidu  
alian pagon por priskibo de la Antaŭ  
Pekina Ekskurso - 20-23 Julio.



**POST-ELNA/KEA KONGRESO EN SIDNEY B.C. / ANTAŬ LA U.K. EN PEKINO**  
**ĜUU NATURBELEGAN BRITAN KOLOMBION**  
**20-23 JULIO**

**DE SYDNEY KAJ VIKTORIO...**



**VANKUVERA INSULO KAJ VANKUVERA REGIONO**

Per 15-pasaĝera buseto, ŝoforita de licencita Esperanto-parolanta ĉiĉerono, ni ĝuos la eblecon vidi la plej bonan parton de Brita Kolombio: Viktorio, kaj norden laŭ la belega marbordo de Vankuvera Insulo; la ĉarmaj insuloj inter Nanaimo kaj la ĉeftero, kaj Vankuvero!

Viktorio, la ĉefurbo de Brita Kolombio restas kvintesece Brita. Kun siaj teĉambroj, duetaĝaj busoj, ĉevaltiritaj "tallyho" kaleŝoj, Victoria fiere prezentas alian, multe pli aĝan, kulturon. Totemfostoj povas esti vidataj en multaj lokaj parkoj, spegulantaj la duoblan heredaĵo de Brita Kolombio.

Vankuvero, aliflanke, estas grandurbo, haveno, kultura centro kaj turisma loko. Ĝi estas la "kronjuvelo" de okcidenta Kanado. La urbo enhavas multe da verdajoj, kaj reliefigas kontraŭ la severaj montopintoj de la ĉiam blua Marborda Montaro, kaj ĉirkaŭita per briletadaj Pacifikaj akvoj. Ĝi kuŝas trans la Markolo de Georgio de la insulo nomita laŭ ĝi. La karaktero de Vankuvero estas Okcident-marborda kun pervada Orienta esenco.

**ITINERO MALLONGE:**

20a julio (mardo) - matena foriro el Sydney, suden tra Viktorio kaj trans la Malahat-Monton al Duncan, kie ni haltos por lunĉo kaj vizito al la Quw'utsun' Kultura kaj Konferenca Centro. La Cowichab Indiĝena Vilaĝo-Centro donas spektaklajn multkomunikilajn prezentojn kaj distrado por familio kiel indiĝenaj dancoj. Ni povos sperti la prezentojn pri lignoĉizado en la Long House Style Studio kaj persone provi la malnovan arton de lignoĉizado. Aŭtentika indiĝena kuirarto povas esti spertita ĉe la Riverwalk Café, laŭ la rivero.

Posttagmeze ni vojaĝos tra Crofton ĝis Chemainus, laŭmarborda juvelo, nostalgia kaj ĝuebla - por promeni apud la mondfamaj freŝaeraj galerioj de murpentraĵoj kaj skulptaĵoj, montrantaj la historion de ĉi tiu kultur-riĉa loko. Komencitaj de lokaj artistoj, la pli ol 30 profesiaj murpentraĵoj montras la historion de la Valo de Chemainus. Temoj varias de Nordamerikaj Indiĝenoj al dramecaj bidoj de la arbranca industrio. Ni iros plu ĝis Nanaimo por tranokto, kaj se tempo permesas, rajdi la pramon 10 minutojn al la Mara Provinca Parko de insulo Newcastle.

21 julio (merkredo) - Matena foriro per pramo el Departure Bay al Horseshoe Bay ĉe la ĉeftero norde de Vankuvero, kaj de tie ni vojaĝos norden laŭ la "Maro al Ĉielo" Ŝoseo ĝis Squamish. La ekskurso sur la fjordeca Howe Sound al la arbranca industria urbeto de Squamish kaj la internacie fama skiejo de Whistler (loko por la Vintra Olimpiko en 2010), enhavas multajn el la allogaĵoj kiuj tiom ĝojigas vivon laŭ la Okcidenta Marbordo. Ni daŭros suden por tranokto en Vankuvero.

22 julio (ĵaŭdo) - Plena tago por ĝui tiom el la mirindaĵoj de Vankuvero kiom eble: Antropologia Museo, Ĉina Kvartalo (prepara por la UK), la Klasika Ĉina Ĝardeno de Sun Y at Sen, kaj Granville Insulo por la bazaro kaj stratmuziko.

23 julio (vendredo) - Foriro al Vankuvera flughaveno por tiuj el ni sufiĉe bonŝancaj povi ĉeesti la UK en Pekino. Nia hotelo situas centre kaj oni povas facile piediri al lokaj allogaĵoj se vi volas resti pli longe. Vi povas ankaŭ mendi ekstrajn noktojn.

**KOSTO:** K\$380 por unu persono, en dulita ĉambro (proks. US\$297)  
K\$500 en unupersona ĉambro (proks. US\$390).

**KOSTO INKLUZIVAS:**

Hotelojn inkluzive imposton  
Transportadon (inkluzive koston de buso kaj pramoj)  
Licencita ŝoforo kaj Esperantista ĉiĉerono  
Ĝojo vojaĝi kun malgranda grupo da Esperantistoj.

**KOSTO NE INKLUZIVAS:**


Manĝaĵojn  
Enirpagojn al allogaĵoj

Grupo estas limigita al 16 personoj kaj la kosto estas bazita je minimumo de 12.

**Por pli da detaloj, kontaktu:**  
**Esperanto Vojaĝ-Servo**  
**[510] 339-2001 - Fax 510-531-0152**  
**Lusiharmon@aol.com**

**POR ALIĜI AL LA POST-KONGRESA EKSKURSO:**  
**Aldonu deponon de US\$100 alla sumo kiun vi sendas**  
**al ELNA por la Kongreso, kaj sur la linio de la aliĝilo**  
**kiu demandas pri programo, aldonu la fakton ke vi**  
**deziras aliĝi al la Post-Kongreso.**

**ĜIS VANKUVERO**



**NEMERE István: Amparolo. Skövde: Al-fab-et-o, 1997. 80 paĝoj. Broŝurita. Ĉe ELNA: Kodo AMPO01, Prezo \$7.90.**

Nemere estas bone konata en Esperantio (kaj ankaŭ Hungario) kiel romanisto. En siaj romanoj li ofte fikciigas verajn okazaĵojn (*Sur kampo granita, Krias la silento*), diskutas gravajn sociajn problemojn (diktaturon en *La blinda birdo*, terorismon en *Serĉu mian sonĝon* — dek-kvar jarojn antaŭ ol la modiĝo de terorismo je 9/11!), prezentas rigardon al la estonteco (*La fermita urbo, Terra*), aŭ simple distras (*Vivi estas danĝere, Serĉu kaj vi trovos*). Oni ofte emas forgesi, ke li verkas ankaŭ novelojn; lia unua Esperantlingva libro estis novelaro (*La naŭa kanalo*).

*Amparolo*, laŭ la dorsa priskribo, traktas en siaj 15 noveloj ne amon sed renkontojn — sed fakte en la mondo de Nemere estas iom malfacile distingi inter la du. Komprenoble, ne temas ĉiam pri amo inter viro kaj virino (en “Orokula Hundo” ni vidas renkonton, eventuale amon, inter viro kaj hundo), kaj kiam temas pri amo inter viro kaj virino, la amo foje povas montriĝi difekta aŭ eĉ amariga (“Viola”, “Retuŝo”) aŭ senespera (“Adana”, kiu iom memorigas la novelon “La ŝlosiloj de decembro” de Roger Zelazny). Foje temas pri amo al etoso, kiu evidente povas transiri ĝis amo al homo (“Surmonte”, “Altiro”, kiuj en iu senco estas la sama novelo, ripetite). Foje eĉ amo inter Dio kaj homoj (“La sciigo”, “La stranga fremdulo”, “La gasto”).

La lingvaĵo estas ne tute neriproĉebla. Kvankam ĝi ĝenerale estas simpla, facile komprenoble (oni foje devas koni, aŭ serĉi, kelkajn specialajn vortojn por birdoj

aŭ plantaĵoj kiuj troviĝas ĉefe en partoj de Eŭropo), estas unu sufiĉe grava difekto: Nemere (aŭ eble la redaktinto — mi tion malofte rimarkis en aliaj verkaĵoj de Nemere) ne scias distingi inter participo difinanta substantivon (adjektiva) kaj participo difinanta kondiĉojn, en kiuj io okazas (adverba), kaj preskaŭ senescepte uzas la unuan, eĉ kiam la dua estas nepre necesa. Nu, la nepreco ne estas ĉiam tiel facile konstatebla, ĉar ambaŭ formoj povas esti ĝustaj, depende de la intenco de la verkinto; ekz-e, sur la unua paĝo de la unua novelo, “Kapreoloj en la nokto”, kiam Viktor diras al si: “Do, mi estas ĉi tie sola, havanta kvardek sep jarojn”, ŝajne la verkinto devis meti “havantE”, sed “havantA” ankaŭ *povus* estis ĝusta. Sed tuj sur la dua paĝo de la novelo, kiam “Virino en mallonga pelto sidis ene kaj kun pordo malfermita, rigardanta malantaŭen provis ekigi la veturilon”, ŝajne “rigardantE” estas nepraĵo, ĉar vere la vorto ne priskribas la virinon sed la situacion de la provo.

Krom tio, oni povas nur laŭdi la lingvaĵon (kaj tion mi eĉ ne menciis se ĝi ne estus oftaĵo). Kaj, komprenoble, la novelojn mem, kiuj, mallongaj, estas ĉiuj gemetoj.

Don Harlow

**JOHANSSON, Sten: Falĉita kiel fojno. Skövde: Al-fab-et-o, 1997. 76p. Broŝurita (vinktitita). Ĉe ELNA: Kodo FAL003, Prezo \$9.20.**

Detektiva romaneto, iom realisma en tio, ke ĝi montras verajn policajn detektivojn, kiuj kolektas faktojn, kiuj neeviteble (kaj post iom da tempo) gvidas ilin al la unusola kriminto, ne al ĉambro da suspektitoj, elinter kiuj ili devas per sia deduktaj povoj elekti la veran kriminton.

Kiam la familio Schulze veturas de sia hejmo apud Hamburg al sia somerdomo apud lago Törn en sudorienta Svedio por kvinsemajna jarferio (verŝajne, ho miaj samlandanoj, tio ne estas tre stranga afero por eŭropanoj), ili ne atendas, ke la

du gefiloj tuj trovos apud la hejmo kadavron murditan de falĉilo. Enketado de polickomisaro Roger Svedberg kaj policinspektoro Tom Jankéus baldaŭ eltrovas, ke la kadavro estas tiu de dana narkotisto kaj kontrabandisto Brian Jespersen, kaj ke la iama amikino de Jespersen, Mette Søbberg, loĝas apud la sama lago kaj posedas apudan butikon de novepokaĵoj. Kaj, komprenoble, Mette havas ian rilaton kun la murdo, sed ne la evidentan ...

La romaneto estas iom internacia laŭ sia aspekto; rolas ne nur Svedio, Danio kaj Germanio (hejmo de la familio Schulze, senkulpuloj kies enplektiĝo en la afero tamen ne finiĝas per la eltrovo de la kadavro), sed ankaŭ Pollando.

Ĉefe temas pri relative simpla Esperanto — nu, ne tute simpla, sed limigita, pli-malpli, al la oficiala lingvaĵo. Troviĝas fina paĝo kun 21 glosoj, sed grandparte temas pri asimilitaj loknomoj (ekz-e “Elsinoro”, “Skanio”) aŭ modernaj ĉiutagaĵoj (“faksi”, “telefaksi”, “retpoŝto”). (Atendante ege bezonatan kasedon el Danlando, sur paĝo 52 Svedberg demandas al sia partnero: “Ĉu ne eblas sendi sonregistraĵon per ia komputila retpoŝto? (kaj, supozante nean respondon) Mezepoke!”) Krom tio, Johansson en unu loko uzas ne la ĝustan “akĉenton” sed “akcenton”, kaj aliloke misliterumas “kurzon” kiel “kurson”. Sed efektive la libro estas tre facile legebla. Mi devas iom protesti pri la uzo de “Nova Aĝo” anstataŭ “Nova Epoko” for “New Age”.

Temas, cetere, pri la unua el kvar romanetoj, ĉiu okazanta en alia sezono, pri la samaj policanoj. Mi kun plezuro legos la tri aliajn.

Don Harlow

**LI Bai: Poemaro de Li Bai (1). Kompilis SHI Chengtai. Riveroj 1997. 141 + 5p. Bindita. ISBN 4-947691-09-3. Ĉe ELNA: Kodo POE004, Prezo \$22.50.**

Li Bai, ankaŭ konata sub la nomo Li Tai Po aŭ Li Po, vivis dum la Tang-dinastio antaŭ preskaŭ

1300 kaj fariĝis (kun sia kundrinkemulo Du Fu) unu el la plej konataj ĉinaj poetoj. Oni povas supozi, ke li, estante orientano, estas same nekonata inter esperantistoj kiel inter parolantoj de aliaj okcidentaj lingvoj, sed ŝajnas, ke liajn poemojn oni komencis traduki eĉ antaŭ la dua mondmilito (kvankam neniu scias, kiu havas la prioritaton, ĉu la japana esperantisto Kenji Ossaka, ĉu la hungara esperantisto Kalman Kalocsay). Ĝis lastatempe, aperis tradukoj de liaj poemoj ĉefe elsub la plumoj de neĉinoj (la menciitaj Ossaka kaj Kalocsay, ankaŭ fasko de William Auld ĉe "La Nica Literatura Revuo"; kelkaj tradukoj de Bradío V. Moro ŝajne ne estas menciitaj ĉi tie). Sed en 1980 kelkaj liaj poemoj, tradukitaj de S. J. Zee de Ŝanhajo, aperis en ties antologio *El Ĉina Poezio*, kaj lastatempe aliaj elŝpruciĝis elsub la plumoj de Shi Chengtai kaj Hu Guozhu, ĉefe en la literature revueto *Penseo*. Eĉ la legenda Armand Su tradukis kelkajn poemojn (almenaŭ unu aperas ĉi tie, kvankam sen kredito en la komenca listo de tradukintoj). Fine, en 1997, laŭ instigo de s-ano Shi (kiu longtempe redaktis *Penseon*) la japana eldonejo "Riveroj" aperigis ĉi tiun kolekton. Kelkaj pli novaj, ĉe la TTT-ejo de *El Popola Ĉinio*, ne aperas en la libro (ekz-e la senkredita versio de "Adiaŭo al Meng Haoran forveturanta al Yangzhou" ne estas tiu de Zee, kiu aperas en ĉi tiu libro). Mi ne scias, kion signifas la "(1)" en la titolo, sed certe mi povas esperi ...

En la libro troviĝas proksimume 100 poemoj diverslongaj. Foje, ili ĉeestas en pli ol unu traduko; ekzemple, mia plejŝatata poemo en la libro, "Ankre ĉe Monta Templo" (p. 90), estas tradukita aparte de Auld kaj de Shi. Evidente, ĉi tiu ne estas elĉerpa kolekto; ekzemple, sur la unua paĝo troviĝas du "Antikveskaj poemoj", n-roj 11 kaj 19 — mankas almenaŭ 1-10 kaj 12-18 ...

Li evidente ŝatis pejzaĝojn (aparte montajn), adiaŭojn, vinon kaj la lunon, kaj tio evidentiĝas en

liaj poemoj. Foje li eĉ sukcesas kombini du el siaj ŝatoj: "Sola dum drinko sub la luno", paĝoj 95-98, kies partojn tradukis kaj Kalocsay kaj Hu. Iom pli koncize li kunigas tiujn ideojn en "Distriĝe" (p. 109):

Kun vintaso krepuskon mi ne sentas,  
petaloj ŝute falas sur la veston.  
Ebrie ĉe rivera lun', dum homoj silentas,  
nur mi promenas; birdoj — en la neston.

Li Bai havis ambicion fariĝi "Feo de Poezio" (feojn oni pli estimas en Ĉinio ol en la Okcidento, kie ili grandparte perdis sian estimindecon dum la lastaj unu-du jarcentoj), kaj laŭ bela legendo (p. 133) li atingis tiun beatan staton. Ĉiukaze, eĉ se la homo mortis, liaj poemoj pludivas, pli ol jarmilon post tiu morto — kaj nun en Esperanta vesto.

Don Harlow

## Nova Literatura Suplemento

Ĉar pro diversaj kialoj aperis nur kvar ekzempleroj de *Esperanto USA* en 2003, ni nun planas aperigi kiom eble plej ampleksan literaturan suplementon al la revuo, fine de 2004. La celata aperdato estos decembro, kaj la suplemento iros al ĉiuj membroj de 2003 kaj 2004.

Ĉiuj, kiuj volas partopreni, bonvolu sendi al ni siajn proponojn. Povas esti poemoj, prozaĵoj aŭ eseoj, originalaj aŭ tradukaj. AVERTO: Se vi tradukas ion, kiu restas sub la kopirajtaj leĝoj, vi mem devos pritrakti akiron de la rajto aperigi la tradukon.

Poemoj povas esti longaj, sed ne epopeaj; ni ankaŭ atentis (relative mallongajn) poemciklojn. Ni akceptos prozaĵojn de ne pli ol 25 000 literospacoj (proks. kvar paĝoj); tamen ni preferos mallongajn, ĉar mankos spaco en la revuo por pli ol unu-du de tiu grandeco.

Sendu proponaĵojn prefere elektronike al donh@donh.best.vwh.net, kun temlinio kiu komenciĝas per "LS:" Se vi devos sendi paperaĵon, bonvolu ĝin ekspedi al "Literatura Suplemento" ĉe la Centra Oficejo de ELNA.

## Letere

Karaj samideanoj el ELNA,  
Elkorajn salutojn.

Eble vi jam konas projekton NESTO. Nia paĝo estas en <<http://www.ameriko.org/nesto>>

Tiu projekto fariĝis la ĉefa motoro de nia Amerika Komisiono (AK/UEA). Ni, el Amerika Oficejo en San-Paŭlo, Brazilo, estras tiun projekton ekde junio. Ni jam ricevis pli ol 250 lernpetantoj por Esperanto-Kurso (KaPe – Kurso de Esperanto de Carlos Pereira – <<http://www.kurso.com.br>>) al kiuj oni direktas niajn virtualajn instruistojn. Bedaŭrinde, mankegas instruistoj por angla lingvo.

Bone, nia nuna kaj grava problemo estas manko de instruistoj en Usono. Ni celas parigi niajn lernantojn kun siaj lokaj instruistoj por helpi eventualan formadon de nukleo de Esperanto en la diversaj regionoj de la mondo. Ni ricevas pli ol 10 lerno-petojn ĉiutage kaj Usono fariĝas unu el la plej vastaj fontoj de lernopetantoj (ĉirkaŭ 30%).

Do, karaj ni bezonas tujan helpon por ke vi diskonigu nian retadreson kaj emfaznu ke oni multe bezonas Nesto-instruistojn por ĉiuj eblaj lokoj de Usono.

Adonis Saliba  
Amerika Komisionestro

## NASK 2004

La venontsomera NASK okazos, kie kutime ĉe la "School for International Training" en Brattleboro, Vermont, inter la 5a kaj 23a de Julio. La kursojn instruos Duncan Charters, Katalin Kovats kaj Lee Miller. Pli da informoj en la venonta numero.

Next summer's NASK (North American Summer Esperanto Courses) will take place, as usual at the "School for International Training" in Brattleboro, Vermont, from July 5 to July 23. Courses will be taught by Duncan Charters, Katalin Kovats and Lee Miller. More information in the next issue.

52<sup>a</sup> Jarkongreso de la  
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko  
Sidney, Brita Kolumbio, Kanado  
16-19 julio 2004



52<sup>nd</sup> Annual Convention of the  
Esperanto League for North America  
Sidney, British Columbia, Canada  
July 16-19, 2004

[esperanto.org/ELNA/kongreso2004](http://esperanto.org/ELNA/kongreso2004)

## Aliĝilo / Registration Form

Ĉiu partoprenanto bonvolu uzi apartan aliĝilon. / Each participant please use a separate form.

NOMO / Name		Nomo preferate por nomŝildo Name preferred for nametag
ADRESO / Address		
URBO / City		Retpoŝto / E-mail
ŜTATO / State	Poŝtkodo / Zip Code	Telefono / Telephone

**Kongreskotizo**, kiu inkluzivas la vendredan akcepton kaj la sabatan bankedon kaj koncerton.

**Convention fee**, which includes the Friday reception and the Saturday banquet and concert.

Antaŭ 12a majo      Post 12a majo  
Before May 12      After May 12

	Antaŭ 12a majo Before May 12	Post 12a majo After May 12
ELNA-membroj kaj eksterusonaj gastoj <i>ELNA members and foreign guests</i> (Kanadanoj aliĝu pere de KEA) <i>(Canadians should register through KEA)</i>	US\$60	US\$75
Usonaj ne-membroj US non-ELNA members	US\$75	US\$90
Studentoj malpli ol 21-jaraj, aŭ tiuj kun limigitaj enspezoj <i>College students under 21, or those with limited income</i>	US\$45	US\$60

Ekskurso post ELNA/KEA kongreso, antaŭ UK - DEPONO US\$100 \_\_\_\_\_

Unutaga kotizo / One-day registration US\$ 35 \_\_\_\_\_

Bankedo kaj koncerto (por familianoj kiuj ne ĉeestos la tagprogramon)  
Banquet and concert (for family members who won't attend the day program) US\$ 25 \_\_\_\_\_

Subtenanto (ne ĉeestos sed ricevos kongresajojn, ret-fotojn kaj resumon)  
Se vi poste decidos partopreni, vi rajtos pagi la diferencon inter \$35 kaj la frua kotizo)  
Supporter (not attending, but will receive convention materials, photos & summary)  
If you later decide to attend, you may pay the difference between \$35 and the early rate) US\$ 35 \_\_\_\_\_

Familia kotizo – pagu por la du plej maljunaj, kaj ĉiu cetera familiano kostos nur  
Family registration – pay for the two oldest, and each additional costs only US\$ 35 \_\_\_\_\_

**ELNA-Membreco / ELNA Membership: Se vi ne estas membro de ELNA por 2004, aliĝu kaj ŝparu! / If you're not a member of ELNA for 2004, join and save!**

Individua membreco / Individual membership US\$ 40 \_\_\_\_\_

Junulara (malpli ol 28-jara) aŭ kun limigitaj enspezoj US\$ 20 \_\_\_\_\_

Youth (under 28) or limited income membership

Aliaj membro-niveleoj kun klarigoj aperas en la TTT-ejo de ELNA: [www.esperanto-usa.org](http://www.esperanto-usa.org).

## Hoteloj / Hotels

Kvanto da cambroj estas rezervitaj por kongresanoj ĉe Victoria Airport Travelodge. La kosto estas K\$115 (proksimume US\$80) plus impostoj por duobla cambro. La hotelo troviĝas tuj trans la strato de la konferencejo. Alvoku 1-866-656-1176, kaj diru ke vi estas parto de la grupo "Esperanto". Aliaj proksimaj hoteloj estas Best Western (ankau tre proksima al la kongresejo) 1-800-315-4477, kaj Sidney Waterfront Hotel (proksimume ses stratoj for) 1-888-656-1131. *A block of rooms has been reserved for conference participants at the Victoria Airport Travelodge. The rate is \$115 CAD (about \$80 USD) plus tax for a double room. The hotel is across the street from the conference center. Call 1-866-656-1176, and say you're part of the "Esperanto" group. Other nearby hotels are Best Western (also within a block) 1-800-315-3377, and Sidney Waterfront Hotel (about 6 blocks away) 1-888-656-1131.*

- Mi volas ricevi kaj partopreni liston de aliaj kiuj deziras dividi cambron (diru agon, sekson, fumanto/nefumanto, Esperanto-parolkapablo).  
*I want to receive and participate in a list of others who want to share a room (tell your age, sex, whether smoker or not, Esperanto level).*
- 

## Sumo pagenda al ELNA en usonaj dolaroj / Total payable to ELNA in US dollars\

(Kanadanoj aliĝu pere de KEA / Canadians should register through KEA)

---

## Pag-maniero / Payment method

- Ĉeko aŭ monmandato / Check or Money Order     Kontante / cash     Kreditkarto / Credit Card

---

KREDITKARTA NUMERO / CREDIT CARD NUMBER

---

Fina Dato / Expiry Date

---

SUBSKRIBO / SIGNATURE

---

DATO / DATE

## Programo / Program

Mi volas kontribui al la programo. Jen mia ideo por prezentaĵo, diskuto, ludo, aŭ alia programero:  
*I want to contribute to the program. Here is my idea for a presentation, discussion, game, or other activity.*

---

---

---

---

---

Aŭ sendu vian ideon al [arlynkerr@earthlink.net](mailto:arlynkerr@earthlink.net) / Or send your idea to [arlynkerr@earthlink.net](mailto:arlynkerr@earthlink.net)

Sendu la aliĝilon kaj pagon al: / Send registration form and payment to:

ELNA  
PO Box 1129  
El Cerrito CA 94530

Officeja uzo / For office use

Oni povas aliĝi ankaŭ ĉe / You can also register at:

[esperanto.org/ELNA/kongreso2004](http://esperanto.org/ELNA/kongreso2004)

Tiu TTT-ejo havas pli da informo pri hoteloj, vidindaĵoj, proksimaj urboj, kaj transporto.

*That web site has more information about hotels, sightseeing, nearby cities, and transportation.*

# Kiel Mihok instruis angle

*de Julio Baghy*

(Unue aperis en *Dancu, marionetoj*, Budapeŝto 1927)

(lastatempe troveblas en *Nova Esperanta Krestomatio*, ĉe UEA, Roterdamo, 1991)

[Jen bela ekzemplo de la humuro de Julio Baghy, hungara aktoro kiu estis eble la plej populara verkisto de Esperanto inter la du mondmilitoj.]

Leŭtenanto Petroff singlarde, iom post iom, ŝovis la kapon el sub la lana kovrilo, ĉirkaŭrigardis. Hela taglumo en la ĉambro. Ekstere sennuba ĉielo. Verŝajne frostoj. Li rigardis la termometron. La enĉambra temperaturo estis dekkvin gradoj super la nulo.

— Brrr! Nur dekkvin gradoj ... Ekstere estas certe minus dudek kvin ...

Aperis antaŭ li la ekzercejo. Liaj dentoj ekklaketis. Li jetis rigardon al la senfajra forno, alian rigardon al la poŝhorlogo, vikle tiktakanta sur la apudlita ŝranketo kaj poste, kovrante sin per la lantukego li kuntiriĝis kiel piktuŝita raŭpo sub brasikfolio.

— Ankoraŭ tro frue ... estus bone dormeti iom! — kaj por provi tion li forte fermis la okulojn.

Senbrue, kiel la ombro, ŝtelis sin en la ĉambron lia servisto Miĥaelo Mihok, pala stangostatura militkaptito. Sub la dekstra brako li premis al si faskon da ligno, sub la maldekstra — pajlaĵon en malnova gazeto, kaj en la manoj li tenis grandan samovaron. Li penadis paŝadi laŭeble senbrue kaj piedpinte. Ĉe ĉiu paŝkaro, glastinto, kulerfalo, seĝrenverso li time kaj respektplene palpebrumis al la lito, kie sub la kovrilo, kvazaŭ minace, montetiĝis la grasa kaj nenomebla parto de la sinjoro leŭtenanto.

Miĥaelo Mihok jam laŭnature estis timema, servema kaj ĝentila. La servemon kaj ĝentilecon li bone profitigis en sia civila profesio. Li estis tajlorlaboristo en provinca

urbeto. Sed li ankaŭ estis timema. Precipe li timis leŭtenanton Petroff, kiun li konis nur de tri tagoj. Ho, kiaj tri tagoj! Vera malfeliĉo, ke oni komandis lin ĉi tien! Escepte kelkajn frazojn li ne komprenis la rusan lingvon. Bonvole li klopodis plenumi la dezirojn, sed la timo ofte paralizis liajn kapablojn. Ne mirinde, ĉar leŭtenanto Petroff estis fortika, grasa, bizonstatura kaj havis leonvoĉon. Certe li devas esti kruela tigo — pensis Mihok.

Ĉiumatene kaj ĉiuvespere ili havis konversacion. Tiaj eĉ pli firmigis lian opinion. Petroff klarigis ĉion per man— kaj piedgestoj, per mimiko kaj diversaj akrobatagoj por komprenigi sin kaj dume aŭdigis leonvoĉon. Mihok streĉis sian atenton, igis ekfunkcii sian etan fantazion por diveni la signifojn de tiuj misteraj manovroj, kiujn faris kun plena energio kaj fervoro la leŭtenanta moŝto. Tamen sinsekvaj miskomprenoj maldolĉigis lian vivon. Nu kaj tiuj turmentaj kapdoloroj, kiuj sekvis la atentostreĉon!? Ankaŭ tio estis iom pli ol nenio.

Sed kial ne lernis Mihok la rusan lingvon? Pro du kaŭzoj. Unue, ĝis nun li nur *vidis* la rusojn, sed *ne vivis* inter ili; due, ĉar li vere ne havis lingvistan talenton. Krom tiuj du estis ankoraŭ tria. Li estis revemulo. Tiu ĉi revemo instigis lin lerni Esperanton. Oni instruis tion en la militkaptitejo. Li do komencis kaj finlernis ĝin. Oni ne povu diri hejme, ke dum longa foresto li ne profitis ion pli utilan ol tiu malbenita nazkataro, kiun li nepetite ricevis en la subteraj barakoj de Tockeo. Tiu ĉi lingvoscio estis triumfo por li, ĉar malgraŭ penoj kaj elspezoj li ne kapablis lerni fremdan lingvon.

La mono ĉiam formigris kaj lia cerbo nur nigris. Sed nun eĉ lia revemo havis freŝan nutraĵon. Li posedas lingvon, kiu egalvaloras ĉiujn, ĉar ĝi estas parolata ĉie, kvankam ne de ĉiu. Sed tio estas pretera bagatelaĵo. Li sentis sin grava persono, pioniro de kulturmovado kaj en sia revo li jam fondis la "In—Tu—As—Es—Ta—He" -n (Internacia Tutmonda Asocio de Esperantistaj Tajlorhelpantoj) kun speciala insigno: verda stelo, trapikita per pinglo kaj kudrilo. Li estos la prezidanto kaj tiam li provos sendanĝere svati la manojn de Rozinjo. Ho Rozinjo, Rozinjo, belega modpupforma filino de kruela majstro, kiu ofte mezuris la ulno al lia dorso dum la lernoĵaroj, se vi konjektus la dolĉan sekreton de Mihok, tiam vi certe ne turmentus la patran koron per ĉiutaga "neniu edzinigas min ... mi devas fariĝi maljuna fraŭlino kun papago kaj kun dekduo da katetoj". Pri la kruela majstro, kaj precipe pri la ulno subite venis ideo, kiun Mihok dorlote vartis en si. Li konsideris sin martiro de tiu ĉi movado. Ĉu ne estis martireco suferi vangofrapojn de kolonelo pro la kvinpinta stelo? Certe jes. La vangofrapoj koncernis verŝajne la *kvinpinton* kaj ne la *koloron*, sed tiaj bagateloj ne gravas. Martiro estos la edzo de la belega modpupforma Rozinjo ... Tia vireto estis Miĥaelo Mihok.

Sed nun la neforpelebla realeco devigis lin servi ĉe tiu ĉi bizonstatura leonvoĉa leŭtenanto, kiu ĉiutage torturas lin per misteraj gestoj, grimacoj, nekompreneblaj akrobataĵoj. Hja, tia estas la sorto!

Li faris fajron en la forno, starigis la samovaron antaŭ ĝin, alĝustigis tubeton, kies finon li metis en la



aperturon de la forno. Tie estis forta aertiro. Poste li pretigis ĉion por la sinlavado de la leŭtenanta moŝto; malplenan sitelon, sapon kaj glason akvo.

Dume leŭtenanto Petroff transdonis sin al la kutima frumatena meditado pri la vivo, pri variado de ŝancoj. Antaŭ unu jaro en Petrograd li fiere paradis en sia nova uniformo sub fenestroj de bela vidvino de tiea komercisto. Li havis esperon kaj imponajn pagonojn, ed venis la revolucio kaj la vidvinon kune kun la kapitalo edzinigis prudenta komisaro. Liaj esperoj kaj pagonoj falis en la koton kaj la sinsekvaj bataloj pelis lin ĝis la ekstrema oriento. La pagonojn li denove havis, sed kia vivo?! Brrr! Li estas ja pacema kiel ... kiel tajloreto kaj tamen ĉi tie ... en la "inĝeniera bataliono ..." Ĉe tiu vorto li ekmiris. Kial oni nomas ĝin "inĝeniera"? Eĉ unu inĝeniero ne troviĝas inter la oficiroj. Profesie li estas ja simpla dentisto, eĉ ne doktoro ... La kapitano estas notario, la ... Eble la kolonelo? Ne! Tute ne! Li havas polbasfabrikon en Udinsk ... Kial bataliono"? Tridek ses oficiroj, kunpelitaj de revoluciaj ventegoj, jam estas bataliono? La soldataro konsistas el kvin dungitaj ĥinoj. Ili flegas ok mizerajn ĉevalojn en la staloj kaj ĉiumatene tiras du kanonojn sur la ekzercejon. Krome estas pli ol kvardek komanditaj militkaptitoj por servi ilin kaj kuiri nemanĝeblaĵojn por la oficiraj stomakoj ... Bah, kia vivo? Pli profite estus eltiradi la dentojn de pacemaj veantoj en Petrograd ol ĉi tie tremadi por la propra vivo kaj ĉiutage prepariĝi por subitaj atakoj de bolŝevikoj ... Kion fari? Jes, rifuĝi, sed kiel kaj kien? ... Kaj ĉi tiuj dungitaj ĥinoj kaj komanditaj militkaptitoj eble ...

Mihok plenumis sian taskon. Ĉio estis en ordo. Li paŝis al la lito, delikate tuŝis la leŭtenantan moŝton. Delikate, sed ne en feliĉa momento. La vigla fantazio de Petroff ĵus skizis teruran situacion, en kiu la ruzaj ĥinoj kun la militkaptitoj konspiris kontraŭ la oficiroj. Kiam Mihok ektuŝis lin,

ĝuste en tiu momento li vidis sin trapikita de sia servisto. La tuŝon li sentis kaj por sin defendi kaptante la revolveron el sub la kusenoj li salte leviĝis kun domskua krio. La malfeliĉa Mihok pro teruro faligis la tason da teo, mortpale humile palpebrumis jen al la danĝera ilo, tenata kontraŭ lia brusto, jen al la terurtaŭzita mieno de la leŭtenanto.

Longminuta paŭzo. Petroff vidante la tremantan kapon de Mihok tuj embarasiĝis. Li sentis honton kaj, por kaŝi ĝin, laŭte ekridis. Mihok pensante, ke ridi estas devo, kiam la mastro ridas, ankau li altrudis mucidan rideton je siaj kurbiĝintaj lipoj. Lia mieno similis al tiu de citronglutanto, kiu volas ŝajnigi, ke la citrono estas mielĉolĉa. Petroff nun plengorĝe kaj sincere ridegis, ĵetis la revolveron sur la liton, rigardis la termometron. Ĝi montris dudek vin gradojn.

— *Haroŝo!* (Bone!) — li diris kaj enlitigis.

Mihok kun tremantaj manoj kolektis la rompitaĵojn, zorge forbalais la splitojn, por ke ili ne vundu la piedojn de la leŭtenanta moŝto, pretigis teon en la glason kaj el respektinda distanco proponis ĝin.

— *Gospodin ... eto ĉaj ... ĉaj ... pitj* (Sinjoro, jen, teo, tetrinku!).

— *Nu, haroŝo ... blagodarju vas ...* (Nu, bone, mi dankas).

Petroff trinkis, Mihok staris ĉe la forno. Kun premegita koro li pripensis la ĵus forpasintan teruraĵon. Lia timemo vestis la estontecon en nigran funebtron, ĉar li estis nun tute konvinkita, ke la sinjoro leŭtenanto estas tigo.

Dum la tetrinko Petroff projektis kelkajn planojn por la rifuĝo. Malagrabla estus kuŝi traborite per kuglo, tiradi dentojn estus pli prudente. El la planoj taŭgis neniu. Hazarde lia rigardo trafis Mihok-on, dancanta je unu piedo al la alia kaj hundokule observante liajn movojn, kaj nova ideo venis, facile efektivegebla. Onidire la militkaptitoj baldaŭ hejmeniros. Estus bone vojaĝi kun ili en Eŭropon. Bedaŭrinde krom la rusa li ne konas alian lingvon. Nu li devas lerni! Sed de kiu? Memkompreneble de

Mihok. Li estas eŭropano, aspektas inteligenta, li nepre devas scii kelkajn lingvojn. Tiu ĉi nepre tuj fariĝis lia fiksa ideo.

— *Herr Mihok ... govoritje pa germanski?* (Sinjoro Mihok, ĉu vi parolas germane?) — li komencis leonvoĉe.

Mihok ektemis. Li komprenis nenion krom la vorto "germanski". Verŝajne la leŭtenanta moŝto bonvolis interesiĝi ĉu li *vidis jam germanon?* Li vidis ja. Kion fari? Eble ne estas kulpo vidi germanon kaj humiltone li informis la tigro-naturan sinjoron.

— *Da!* (Jes!)

— *Nu haroŝo ... i pa francuski?* (Nu bone kaj france?)

Mihok iom pripensis la demandon, esploris en siaj memoroj. Kie li vidis francon? Ah, jes! En la modgazetoj ĉe lia majstro. Certe tiuj bildoj figuris francojn, ĉar la gazeto venis el Parizo.

— *Da, da!* — li respondis post ioma konsidero.

— *I toje pa angliski?* (Kaj ankaŭ angle?)

Mihok embarasiĝis. Nun jam li tute ne komprenis la leŭtenantan moŝton, sed por daŭra pripensado li ne havis tempon, ĉar okuloj kvazaŭ trapikis lin. Li rapidis do respondi.

— *Dadada!*

— *Ĉto dadada?* (Kio jesjesjes?)

— *Niĉevo!* (Nenio!)

— *Ĉto nicevo?*

— *Niĉevo dadadada njet!* (Nenio jesjesjesjes ne!)

La sensenca respondo pruvis, ke Mihok miskomprenis lin, sed tamen Petroff pensis, ke eŭropano nepre devas paroli tiujn lingvojn. Mihok aspektas inteligenta, estas eŭropano, li do parolas tiujn lingvojn. Petroff provis alimaniere komprenigi sin. Li montradis al diversaj objektoj de la ĉambro kaj leonvoĉe demandis, pensante, ke la tono plialtigita helpas en la interpretado.

— *Pa germanski ... pa francuski ... pa angliski?*

Mihok iom post iom ekkomprenis pri kio temas kaj tiam elbalbutis la lastan frazon de sia rusa lingvoprovizo.

— *Ja nje znaju!* (Mi ne scias!)

Leŭtenanto Petroff ne volis kredi je siaj oreloj, eble li malbone aŭdis. La konsterniĝo kvazaŭ tondris en lia voĉo.

— *Ĉto vi nje znajtje?* (Kion vi ne scias?)

Pizograndaj ŝvitgutoj aperis ĉe la tempioj de Mihok. Li pensis, ke tiu ĉi terura homo certe mortpafos lin, se li ne scias ĉion, kio estas postulata. La malesperiga situacio donis al li genian ideon, kiu savos lian vivon almenaŭ por la momento. Kiam Petroff persistis plu en montrado kaj demandado, volante scii germane la vorton *seĝo* tiam li senhezite respondis.

— Das seĝungen.

— *Pa francuski?*

— Le seĝ.

— *I pa angliski?*

— The siĝ.

Petroff estis kontenta, sed por tute konvinkiĝi li komencis novan provon montrante tra la fenestro al tureto, kiu staris sur la ekzercejo de la urba fajrobrigado.

— *Nu, Herr Mihok, pa germanski?*

— Der turung.

— *Pa francuski?*

— La Eiffel.

— *Pa angliski?*

— Krevu tuj, se mi scias! — eligis la amareco el Mihok.

— Krevutuj ... *Da, da, da ... oĉĉĉen interesni* (tre interesel) ... Krevutuj ...

La apetito de Petroff ĉiu-momente pliiĝis por la fremdaj lingvoj. Li decidis formangi ilin. Per gestoj, grimacoj kaj akrobataĵoj li tuj klarigis al Mihok, ke li devos ĉe ĉiu sunleviĝo preni libron kaj instrui lin, kaj Mihok komprenis, ke li devas la sunon forŝteli de la ĉielo, meti ĝin en la Biblion kaj per la Sankta Libro li devos kelkfoje bati la kapon de la leŭtenanta moŝto. Sed kiel li kuraĝus fari tion? Bati la kapon de la sinjoro leŭtenanto?!

Petroff ellitiĝis, lavis sin per plenbuŝo da akvo kaj post la finvestado li amike frapetadis la ŝultrojn de Mihok, kiu preskaŭ terenfalas pro tiu ĉi intimaĵo. Kiam Petroff estis ekster la domo, li surgenu, kiel bona katoliko, promesis dekduon da kandeloj al

Sankta Antonio, se li forkondukos lin sana kaj nekripligita el la manoj de tiu ĉi tignonatura sinjoro.

La tagoj pasis. Ĉiu mateno alportis sian kvarlingvan torturon. Petroff demandis, Mihok respondis kaj ĉe la fino li promesis ĉiam unu dekduon da kandeloj.

Iun tagon Petroff surprizis lin, ke li decidis lerni nur la anglan lingvon kaj li jam aĉetis kajeron, krajonon por noti ĉion necesan. Mihok sentis batadi la koron en sia gorĝo. Kion fari? Ĝis nun estis facile, ĉar la leŭtenanta moŝto nenion notis kaj forgesis ĉion ĝis la alia mateno. La kajero kaj kraĵono malebligas la devigatan trompon. Li decidis konfesi, ke lia angla scio egalas la nulon, sed en la lasta momento rigardante la bizonstaturan leŭtenanton li rememoris pri la revolvero kaj rezignis. Venu, kio devas veni! Ankoraŭ kelkaj funtoj da kandeloj pli aŭ malpli al Sankta Antonio ne multon diferencos kaj li sisteme komencis instrui *Esperanton* nomante ĝin *angla lingvo*.

Petroff montriĝis entuziasma anglofilo. Li diligente lernis ĉie: en la kazerno, sur la ekzercejo, en la oficira manĝejo, en la intima ĉambreto de ... sed tio ne apartenas al tiu ĉi historio.

Foje dum promeno li rimarkis ilustritan revuon, kuŝantan sur la trotuaro. Kelkaj ĉifitaj folioj de la malnova "The London News". La titolo frapis lian atenton.

— Londono estas metropolo en Anglujo — li komencis konkludadi — tio estas certa. Nun ĉar la titolo diras "London", pli ol verŝajne la gazeto venis el London kaj se ĝi venis el London, sekve ĝi estas angla gazeto. Nu, ni kontrolu nin!

Li levis la foliojn, singarde glatigis ilin kaj provis legi kelkajn liniojn. Li ne komprenis. Iom ekscitite li rigardis ĉiujn paĝojn kun la espero, ke li trovos almenaŭ unu kompreneblan frazeton. Ne, ne kaj ne! Pro diablo, kiel povas okazi, ke eĉ vorteton li ne komprenis.

Konsternite li rapidis hejmen. Certe Mihok povos klarigi la kialon. Mihok estis puriganta liajn botojn

kaj silente malbenadis la ciron, kiu bezonas tiom da kraĉoj. En Eŭropo oni purigas botojn per lakkremo kaj ne devas elsputati la pulmon por fari la botojn spegulbrilaj. Petroff ekhaltis antaŭ li, iom hezitis kaj fine metis la foliojn antaŭ la nazon de Mihok.

— Kijo estas tijo ĉi?

Mihok iom indiferece rigardis la foliojn.

— Verŝajne gazeto.

Petroff eksplodis. — Nje verŝajnje, sed tutje certje ... Sed kija, dijru Mihok, kija gazeto?

Mihok eklevis la ŝultrojn, gapis al la folioj, kiujn Petroff minace svingis antaŭ lia nazo.

— Mi ne scias, — konfesis sincere Mihok.

— Vi nje scijas, Mihok, nje scijas? — kriis Petroff kaj kunfrapis la manojn. — Angla gazeto, Mihok, angla gazeto ... Nun vi scijas.

Sub la haŭto de Mihok la frostotremo komencis kaŝludon.

— Ne diru, sinjoro leŭtenanto ... ĉu vere?

— Sed jes, mi djiras ... angla gazeto ... Legu! The-London-nje-vo ... Mi ne komprenjis eĉ vorton ... Legu!

Mihok transprenis la foliojn, rigardis ilin kun terurŝteĉitaj okuloj, sed post momento maŝinrapide fluis vortotorento el lia buŝo.

— Enlamondonvenisnovasento ... tralamondoirasfortavoko ... perflugilojdefacilavento ...

Ĉe Petroff admiro sekvis la koleron kaj dubon.

— Vi scijas legi. Tutje bonje vi scijas legi! Kijel, ke mi nje scijas?

— Vi forgesis verŝajne, sinjoro leŭtenanto, ke la angloj ne tiel skribas, kiel ili parolas. Ekzemple, ili diras: "Bonan matenon, sinjoro" kaj ili skribas "The Szentantalkam, segits meg!" (hungare: Sanktantonĉjo helpu min!) Ĉu vi komprenas? — kaj por konvinki la miregantian leŭtenanton pri sia pravo li serĉis inter la ilustraĵoj unu, kiu figuris ekzotikan tribestron kaj anstataŭ la subbilda teksto li komencis legi la *Historion de Homaro* el lernolibro de E. Privat. Tion li sciis parkere kaj la teksto, se iom

lame, tamen taŭgis: “Kiam la maljuna reĝo de Persujo mortis, lia filo, la juna princo Zemir eksidis sur la tronon ...”

Petroff kontentigite foriris. De tiu tago Mihok skrupule atentis la horizonton, ĉu ia anglo ne aperos por renversi ĉion? Tiukaze la leŭtenanta moŝto certe ekspedos lin afrankite al la alia mondo ... eble sen kapo. Ĉiutage li promesis novan dekduon da kandeloj kaj pasis longaj monatoj sen notinda okazintaĵo.

Petroff jam bonege parolis la *anglan* lingvon kaj ankaŭ Mihok rekonis en sia leŭtenanto la ĝeneralan bonkorecon de la rusoj kaj flameman entuziasmon por belo kaj bono. Li decidis konfesi sian kulpon, se venos bona okazo.

Okazo venis, sed ne bona, ĉar homo projektas, Dio direktas. Ĵus kiam li ne estis preparita por eventualaĵoj, venis hejmen Petroff kun fremda rusa oficiro. La malfeliĉa Mihok sentis sian kuraĝon paralizita kiel en la unuaj tagoj.

— Mihok, parolu kun tiu ĉi sinjoro, sed tuj! — komencis Petroff kaj lia voĉo tremis pro la retenitaj kolero kaj indigno. Li asertas, ke li parolas angle ... Parolu kun li angle ... *Tiu* anglan lingvon mi ne komprenas.

La haroj stariĝis sur la kapo de Mihok. Nu Sankta Antonĉjo nun helpu — li komencis preĝi en si, — kvintalon da kandeloj mi bruligos por vi post hejmvveno. Li klare vidis, ke nun la pentvoĉa konfeso neniel utilos. Se li komencis ĉi tiun altrudititan tragikomedion, li devas finludi ĝin. Nur la impertinenteco povas helpi kaj Antonĉjo. Riskante ĉion je unu kubjeto li ŝajnis trankvilon.

— Kie kaj de kiu lernis la sinjoro tiun ĉi anglan lingvon?

— Ĉi tie, de soldato el la amerika armeo.

— Ah, jes! — Mihok plenvlovis sin. La timo, kiel multajn, faris lin aŭdaca en la minutoj de danĝero. Li mem ne konjektis, ke tiom da kuraĝo nestas en li. Kun rideto li laŭrigis. — La sinjoro lernis la *amerikan dialekton* de la angla lingvo, dum ni parolas la *klasikan lingvon*

de la *londona aristokrataro*. Jen la diferenco ... Je mia Dio, mi tre ŝatus paroli ankaŭ tiun lingvon, sed mi pensis, oni devas scii unue la klasikan, la aristokratan, kaj poste la popolan ... ĉu ne, leŭtenanta moŝto?

La kolero de Petroff vaporiĝis, forflugis kaj eĉ aprobe li balancis la kapon. Tre imponis al li la aludo pri aristokratoj. Li interpretis la vortojn de Mihok, sed la fremda oficiro dube ridetis kaj faris demandon. Petroff tradukis.

— Kie oni povas uzi ĉi tiun lingvon ekster la aristokrataj kvartaloj de London, se la popolo parolas alian lingvon?

En Mihok vekigis la propagandisto.

— Ĉiel! En ĉiu lando de la mondo! Eĉ en tiu ĉi urbo! Ĉu vi ne volas kredi? Mi pruvos tion. Bonvolu veni kun mi dimanĉe en la urbon kaj konvinkiĝu, kiu valoras pli: via amerika dialekto aŭ nia klasika angla lingvo?

Petroff denove interpretis kaj ili decidis, ke dimanĉe triope vizitos la urbon.

Mihok sincere ĝojis, sentis sin pli facila, ĉar li estis sur la plej bona vojo malkaŝi ĉion sen fiasko. En la urbo estis granda societo, kie ĉiudimance amase kunvenis babiladi la esperantistoj. Vera internacia societo: germanoj, bulgarioj, turkoj, hungaroj, japanoj el la diverslandaj armeoj; ĉarmaj virinoj, agrablaj viroj el la urbo mem.

Mihok zorge preparis sin por la publika konfeso. Ĉe la pordego de la domo ankoraŭ unu funto da kandeloj kaj Mihok kondukis sian leŭtenanton kaj la fremdan oficiron en la societon. Ilin surprizis la diversnacieco kaj tiu amika intimito, kiu kvazaŭ sklavigis la vizitantojn. Mihok prezentis ilin al ĉiu ĉeestanto aparte.

— Jen turko, alparolu lin! Jen polo, alparolu ŝin! Jen ĥino, alparolu lin! Jen japano, alparolu lin!

Petroff havis kapturton pro feliĉo, ke li komprenis ĉiujn kaj estis komprenata de ĉiuj. Male lia akompanato, ĉar escepte du amerikajn soldatojn neniu komprenis

lian “dialekton”. Li estis devigata rekoni, ke la “aristokrata” angla lingvo superas la popolan.

Kaj Mihok en solena silento publike konfesis sian kulpon, petis indulgon de leŭtenanto Petroff, kiu pro ia neklarigebla sento forgesis pri ĉio ĉirkaŭ si kaj kun vera rusa flamemo li ĉirkaŭprenis sian serviston, kisis trifoje lian buŝon por sigeli la fratecon ... Tiel instruis Mihok la anglan lingvon kaj tiel fariĝis Petroff entuziasma samideano.

Tamen la fino de ĉi tiu historio ne estas tre kontentiga. Mihok, kiel bona katoliko, du jarojn laboris por la kandeloj, promesitaj al Sankta Antonio kaj dum tiu tempo la belegan modpupforman Rozinjon edzinigis lia kolego. Tiam li riproĉis iomete Sanktan Antonĉjon, sed kiu scias, ĉu ne la sanktulo savis lin el tiu infero, en kiun la alia falis. Ni scias nur, ke Mihok restis sola kun la revo “fondi la In—Tu—As—Es—Ta—He”—n kun speciala insigno: verda stelo, trapikita per pinglo kaj kudrilo.

### NI PERDIS ...

En lastaj monatoj forpasis tri gravaj anoj de ELNA. Temas pri

Sid Culbert  
Stanley Neil Glass  
R. Kent Jones

En la venonta numero aperos plenaj nekrologoj. Sed intertempe ni paŭzu kaj pripensu, kion ili signifis al ni. Ne forgesu, ke dum multaj jaroj Sid respondecis pri la tabelo de lingvoj en *The World Almanac and Book of Facts*, Stano estis unu el la motoroj de la klubo en Sankta Luiso (kaj ankaŭ tre aktiva en la reto), kaj Kent estis dum jaroj la ELNA komisiito pri edukado, kaj ankaŭ ĉefesploranto pri la lingva problemoj en aviado.

## ESTOS FACILE KAJ ĜOJIGE VOJAĜI ESPERANTE EN 2004

### TUT-AMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO

*La 6a TAKE okazos en Havana Kubo 21-27an de marto.*

Tamen, je dato de verkado (1 decembro 2003) nur kelkaj Usonaj civitanoj rajtas iri tien. La "specifaj" permesiloj kiuj rajtigis multajn personojn viziti Kubon dum pasintaj jaroj jam malaperis por ĉi tiu jaro, kaj estas dubo ke ili refoje estos garantiitaj. La "ĝeneralaj" permesiloj nur permesas al profesiuloj en iu fako iri al profesiaj konferencoj. Laŭ mia scio, estas nur unu "profesia plentempa Esperantisto" kiu rajtus iri al Esperanto-konferenco. Estas kelkaj aliaj esceptoj, sed ne multaj. Se vi deziras legi la regulojn, vi povas trovi la informon ĉe:

<http://www.ustreas.gov/offices/eotff/ofac/sanctions/sanctguide-cuba.html>

### TUT-KALIFORNIA ESPERANTA KONFERENCO

7 - 9 majo 2004 - San Francisko

Temo: Ni ludu Esperante!

Informo ĉe: <http://www.esperanto.org/us/SFERO/TKEK2004/>

### NORD-AMERIKA SOMERA KURSARO DE ESPERANTO

("NASK") *Bratdeboro, Vermont - 5-23 julio 2004.*

This year there will be not only 3 levels of classes, but also a class for teachers of Esperanto - about how to use video material in classes. Informo de Ellen Eddy - [eddyellen@aol.com](mailto:eddyellen@aol.com) aŭ 360-754-4563.

### KOMBINAJ KONGRESOJ DE ELNA KAJ KEA

*16a-19a July, Sidney, British Columbia*

(See description and aliĝilo inside)

### ANTAŬ-EKSKURSO DE LA UNIVERSALA KONGRESO

*British Columbia with Sidney, Victoria, Vancouver Island and the mainland - 20 - 23 July.*

(SEE DESCRIPTION INSIDE)

Vi facile povos ĝui la ELNA/KEA kongreson plus "inter-kongresaj ekskursoj" kaj flugi rekte al Pekino.

### NOREK ĈI JARE OKAZOS EN BOISE, IDAHO!!

10-12 September 2004


Oni devas iom streĉi la signifon de "Nord-Oriento", tamen Boise estas en tiu regiono kaj aŭtune estas la plej bela sezono por viziti! Speciala noto: art-festivalo okazos en la parko tiu semajnfino! Detaloj haveblaj de Anna Bennett - 208-343-2466 aŭ [annabennett@yahoo.com](mailto:annabennett@yahoo.com).

### OKEMO

Tradicie okazos aŭtune. Informo havigos pri tio iom poste. Do certe multaj vizitindaj renkontiĝoj haveblas al ni dum 2004!

### 89A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

PEKINO, ĈINIO - 24-31 julio, 2004



Okazos en la nova konferenco-centro, multe pli komforta ol tiu uzita dum la UK antaŭ 18 jaroj. Ne pre sendu aliĝilon al UEA (pere de ELNA) kiel eble plej baldaŭ. Se vi ne havas aliĝilon, petu de EVS.

### POST KONGRESA EKSKURSO, 1-9 aŭgusto 2004

*Lando de la Plej Malplimultoj*

**Tropikaj pluvarbaroj, majestaj montoj, kolorplenaj tradicioj!**

Fly to Kunming, visit: Stone forest, Golden Temple, Yunnan museum, Taoist Temple, Sani people; fly to Dali, visit Changshan Mountain, Three Pagodas, Bai Cultural Performance, and on to beautiful Lijiang, home to the Naxi people; visit Black Dragon Pool, Dongba Cultural Institute, Jade Dragon Snow Mountain, Yufeng Lama Temple and Baisha Village. Fly to Hong Kong for overnight and to connect to homeward or onward flights. Details have been sent to all those who have asked for information. If you haven't received details, be sure to contact Esperanto Vojaĝ-Servo. We will also help you with the best flights and getting your visas.

Nia ekskurso vizitos lokojn ne tiel bone konatajn kiel la plej kutimaj vojoj, kaj entenas multajn apartajn naciajn malplimultojn de Ĉinio. Ankaŭ, ni estos plejparte en montoj, kie la vetero estos pli milda, malpli varmega kompare kun la kutimaj glataj partoj de la lando.

### Esperanto Vojaĝ-Servo

6104 La Salle Ave., Oakland CA 94611

(510)339-2001 [LusiHarmon@aol.com](mailto:LusiHarmon@aol.com)

**Esperanto League for North America**  
**PO Box 1129**  
**El Cerrito CA 94530**

Non-Profit Org  
US POSTAGE  
PAID  
Leesburg FL  
Permit # 1040